

# La Parabolo pri la Malsaĝa Abel

James E. Talmage

Pro labordevoj mi postulas, de tempo al tempo, kvietecon kaj izolitecon, kian nek mia komforta oficejo nek mia hejmeca studejo povas doni. Mia plej ŝatata rifuĝejo estas supera ĉambro en la turo de granda konstruaĵo for de la bruo kaj konfuzo de la urbaj stratoj. La ĉambro estas iom malfacile atingebla kaj relative sekura kontraŭ la homa invado. Tie mi pasigas multe da serenaj kaj okupataj horoj kun libroj kaj kraĵono.

Mi ne restas ĉiam do sen gastoj, precipe en somero, ĉar kiam mi malfermas la fenestrojn flugantaj insektoj foje-foje trovas la enirejon kaj dividas la lokalon kun mi. Ĉi tiuj meminvititaj gastoj estas ne malbonvenaj. Plurfoje mi kuŝigas mian skribilon kaj forgesante la temon de mia veraĵo, rigardas kun intereso la agojn de ĉi tiuj flugilhavantaj vizitantoj, kun postpenso, ke la tempo pasigita estas ne senutilaĵo ĉar eĉ papilio, skarabo aŭ abelo povas esti portanto de lecionoj al la atentema studanto.

Sovaĝa abelo de la apudaj montetoj iutage flugis en la ĉambron kaj dum pli malpli unu horo, mi kun plezuro aŭskultis la zumadon de ĝia flugado. La eta kreitaĵo konstatis, ke ĝi estas malliberulo. Ĉiom da ĝiaj streboj trovi la elirejon fiaskis. Mi provis helpi, malfermante la fenestron kaj provante gvidi la abelon al libereco, foje eĉ pelante ĝin al sendanĝero kaj sekureco, kiuj lin atendis trans la malfermita fenestro, tute konscia pri la fakto, ke se la abelo restos enfermita en la ĉambro, ĝi pereos samkiel aliaj insektoj mortis en la seka aero de enfermitaĵo. Ju pli mi provis peli ĝin ekstere, des pli ĝi kontraŭstaris kaj rezistis min. Ĝia antaŭa paca zumado iĝis kolera blekado. Ĝia flugado fariĝis minaca kaj malamika.

Tiam ĝi min surprizatakis kaj vundpikis la manon, kiu volis gvidi ĝin al libereco. Finfine la abelo flugis al la plafona lampo kaj tie iom kvietiĝis. La akra doloro de ĝia malafabla piko vekis en mi kompaton, ne koleron. Mi konsciis pri la certa puno de ĝia erara kontraŭstaro kaj ribelo. Mi lasis ĝin al ĝia sorto. Tri tagojn poste, mi revenis al la ĉambro kaj trovis la sekan, mortan korpon de la abelo sur la skribotablo. Ĝi pagis por sia obstineco per sia vivo.

Al la abela malsaĝeco kaj egoista nekompreno, mi estis malamiko, persista persekutanto, mortiga malamiko, celante ĝian detruon. La vero estas, ke mi estis ĝia amiko proponanta al ĝi elaĉeton kaj vivon. Ĝi perdis ĉion pro propra eraro. Mi penadis savi ĝin, liberigi ĝin el la mallibereja domo de morto kaj restarigi ĝin en la ekstera aero kaj libereco.

Ĉu ni kapablas kompreni pli ol la abelo? Kia rilato troviĝas inter ĝia malsaĝa direkto kaj niaj vivoj? Ni konsideru la lecionon de la malsaĝa abelo.